Mr. W. H. King, President of the last Congress and a former President of the A.E.A. sends a donation of 10/-.

La nova alservistino ĵus alvenis, kaj la mastrino sciigis al ŝi kelkajn informojn pri ŝia laboro. “Nu, sinjorino B.,” finante ŝi diris, “bonvolu memori, ke mi estas virino nemultvorta. Se mi mansignas, tio signifas ‘Venu.’” “Tio bone plaĉos al mi, sinjorino,” respondis la alservistino, “car mi ankaŭ estas virino nemultvorta. Se mi kapskuas, vi komprenos, ke tio signifas ‘Nenio farota.’” (Trad. S. Trewin.)

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Cu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POB. VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn, el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

ESPERANTO.

Ordinare, simpla vorto enhavas nur unu ideon sed malgraŭ tio ĝi estas disigebla kaj la disiganto trovos, ke ĝi bezonas nombron da ioj, nomataj literoj, por esprimi la ideon.

Mi disigos la vorton Esperanto kaj eble mi montros, ke same kiel simpla vorto bezonas literojn por kompletigi la ideon, tiel ankaŭ Esperanto bezonas ideojn por kompletigi la sencon.

Ni konsideru la vorton "saĝo"; ĝi prezentas nur unu ideon, t.e. meblero, sed se oni aldonas la prefikson "brak—" ĝi fariĝas vorto kiu prezentos du ideojn. Ne nur ĝi estas meblero, sed ĝi estas aparta speco de meblero "brakseĝo."

Unuavide Esperanto nur montras unu ideon. Mi volas montri kiamaniere ĝi havas multe pli ol unu ideo.

Same kiel la vorto "tablo" bezonas la kvin literojn por kompletigi la ideon de tiu meblero, tiel ankaŭ Esperanto bezonas ecojn por kompletigi la ideojn, kiujn ĝi enhavas.

La unua eco laŭ la ordo de la literoj en la vorto Esperanto estas. **Energieco.**

Sen tiu-ĉi eco nenio povas daŭri longatempe. Nia majstro Dro. Zamenhof montris grandan energion per siaj senĉesaj penadoj naskigi internacian helpan lingvon kaj sendube se li perdis la energion la mondo neniam estus posedinta Esperanton.

Kvankam Esperanto bezonas la energiecon ĝi utilas neniel se ne ekzistas personoj por direkti ĝin en la ĝustan vojon kaj tiuj personoj estas la Esperantistoj.

La dua eco estas **Seriozeco.**

Se ni deziras interesigi pensemajn personojn ni devos vidigi al ili, ke Esperanto ne estas ŝerco, nur io por pasigi la tempon, sed ke ĝi valoras esti traktata kiel gravan aferon.

Mi elektas por la tria eco: **Pacemeco.**

Ebla tiu-ĉi estas la plej grava el ĉiuj, ĉar ĝi prezentas idealon, kiu servos kunligi la diversajn popolojn de la terglobo. Pacemeco nur ekzistas en la menso. Jen estas da personoj aŭskultante al muzikaĵo. Unu estas kontentigita, la alia tedegita. Kio estas la kialo de la diferenco. Ŝajne la muziko, sed, se ni enrigardas en la aferon pli profunde ni

eltrovos, ke la diferenco ekzistas ĉe la mensoj de la du aŭskultantoj.

La muziko mankis kontentigi la du personojn ĉar ĝi nur vokis al unu menso.

Esperanto devas posedi tion, kio vokos al la menso de ĉiu, kiu renkontos la movadon.

La kvara eco estas **Espereco.**

Se ni havas pacan staton inter diversaj naciuloj ni ne povas ne esperi, ke ni altiĝos ĝis pli inda nivelo.

Esperanto — tiu, kiu esperas — sukcesos neniel se li ne ankaŭ agas.

Antaŭ nelonge mi vidis tiun - ĉi anoncaĵon. "Ne esperu por la plej bona, envenu kaj akiru ĝin."

La Esperantistoj devas eniri kaj akiri tion, por kio ili esperas. t.e. "La fratigado de la mondo."

Mi metas Raciecon ĉe la mezo, ĉar ni ne povas fari multe da malutilo kiam ni havas tian econ ĉe la koro de aferoj.

Mi aldonu **Adapteblecon.**

Esperanto devas esti adaptebla, alie ĝi ne valoras multe. La pruvo de elpensajo estas laŭ ĝia adaptebleco. Esperanto estas elpensajo kaj devas meriti, ke la mondo pensu pri ĝi, kiel io, kion ĝi povas adapti kaj tiel plibonigi la staton de aferoj, kiu ekzistas hodiaŭ.

Por ke ĝi estu vere internacia, Esperanto devas posedi **Neŭtralecon.**

Kiel longe ĝi tenas neŭtralan flankon, tiel longe ĝi ne trudos sin je iu ajn, kaj tial ĉiu povos bonvenigi ĝin, bone sciante ke ĝi celas forigi nenion, krom la barilon de nekomprenebleco.

Mi komencis la liston per **Energieco**, sed tio ne povos daŭri por ĉiam sen ĝia komplemento **Tenemeco**. Se mia lingvo celas esti la sola internacia lingvo pruvanta sian utilecon super ĉiuj konkurantoj ĝi devos montri, ke ĝi posedas teneman pelpovon, kiu restos ĝis la fino.

Laste sed ne malpleje mi aldonas **Oferemeco**. Posedante tiajn ecojn, kiajn ni havas supre, valoras, ke ni estu pretaj doni niajn servadojn al la celoj de la internacia lingvo movado.

Tiamaniere mi silabas Esperanton: —**Energieco, Seriozeco, Pacemeco, Espereco Racieco, Adaptebleco, Neŭtraleco, Tenemeco, Oferemeco.**

(Mallongigita el parolado farita de S-ro R. J. Dodd, B.E.A., antaŭ la Sydney Esp. Soc.)

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

—
Estimata samideano,

De tempo al tempo oni legas pri ranoj, kiuj troviĝis ankoraŭ viva en la mezo de solida roko. Tiuj reportoj estas nekredeblaj, ĉar en tiuj okazoj, la ranoj devas esti centojn da jaroj aĝaj, sed oni ne povas dubi, ke ranoj ja vivas dum du aŭ tri jaroj, malliberigitaj en malmola sekiĝinta koto, ĉe la centraj regionoj de Aŭstralio. Estas nur pro tio, se ili povas fari tion, ke ili povas vivi dum la longaj pluvmankaj periodoj, kaj flankaje provizi la indiĝencjn per akvo por trinki je la plej akvomanka periodo.

La indiĝenoj gvidataj per la malgrandaj truoj, facile trovas la lokon, kie la rano estas havebla, ĉirkaŭ 12 colojn malsupre en la sekiĝinta koto de ia rivereto. Tiuj ĉi ranoj, kiam elfositaj el siaj sekavetera loĝejo, estas tute rondaj, kaj vastkorpaj, kaj en iliaj korpoj troviĝas multe da freŝa kaj trinkebla akvo, kio estas ŝatata kaj de la vojaĝanta blankhaŭtulo en tiuj distriktoj kaj de la indiĝenoj. Kiam pluis, tio estas post daŭra pluvo, kiu penetras al la kaŝejo de la rano, ĝi tuj vekigias, kaj post kelkaj horoj la aero resonadas per la kvakado de miloj da ranoj, kie iom da tempo antaŭe oni ne povis kredi, ke ekzistis eĉ unu rano.

Riĉeco atendas la homo, kiu estos sufiĉe lerta elpensi ian efektivan metodon havigi la oron el la riĉaj sabloj, kiuj troviĝas laŭ la marbordoj de la suda insulo de Nova Zelando. Tia sablo ĝis granda profundeco sin etendas pli ol cent mejlojn sed la sablo mem estas tiel peza, ke ĝis nun, nenia metodo sukcesis apartigi la oron je sufiĉa profito. Post ĉiu ventego, je la elfluinta tajdo, rubando de flavo etendiĝas por mejloj laŭ la marbordo lavadita de la fortaj ondoj. Dum kelkaj horoj la oreretoj

estas videblaj; tiam ĉe la enfluo de la tajdo ili estas denove surkovritaj de la sablo. Estas bone konate, ke urbeto nomata "Hokitiki," estas konstruita plej parte sur ora sablo. Dum plifruaj tagoj miloj da ministoj gajnis vivrimedon prilaborante la sablon sur la marbordo. La oron oni gajnis per diversaj metodoj. La plej efektiva estis la skatolo kovrita per peco el lana litkoverilo. Sed kia oportuno por scienculo! Cent mejlojn da sablo por prilabori, kun iom da oro trovebla ĉie eĉ al granda profundeco. Kredeble ia metodo havigi la oron iam troviĝos.

Ŝajne la plej grava malhelpaĵo de starigita maŝinaro estas la ventega maro. Per skrapeĝsipo oni penis gajni la oron, sed la unua ventego dispecigis ĝin. Alia grava malhelpaĵo estas la pezeco de la nigra sablo. Gajni la oron laŭ ordinariaj metodoj estas tro malrapida.

Kun kora manpremo via fidele,
P. H.

—
NEW PUBLICATIONS.

—
From the British Esperanto Association the following have come to hand:—

INTERNATIONAL RADIO MANUAL, by H. A. Epton, 80 pages, 6d. The contents include a Preface by C. H. Edmonds, a short radio course of Esperanto, English-Esperanto and Esperanto-English Radio dictionary, list of principal broadcasting stations of the world, illustrations of radio symbols with their names in Esperanto and miscellaneous facts. Among the latter, mention is made that "Wireless Weekly," (Australia), has officially adopted Esperanto. Elsewhere it is stated that 3LO Melbourne transmits Esperanto fortnightly and that 3AR Melbourne transmits Esperanto on the last Monday in each month.

A NORMAN CONQUEST, by William Morrison, F.B.E.A.

This is a reprint from one of the B.E.A. publications of the propaganda three act comedy in English. The dramatis personae consist of one male and three females. There are only four characters, (one has a very small part), and as there is only one scene setting, it should be a popular production at Esperanto gatherings.

FOR THE SCHOOL LIBRARY

Spoken Esperanto: Frost

By the DIRECT METHOD for BEGINNERS
Stiff Paper Covers 56 Cents, postpaid

—
N.W. Frost, 12 Ash Place, Cambridge 38 Mass.

JARRAPORTO DE U. E. A.

La raporto pri la pasinta jaro portas daton januaro-februaro, sed nun nun alvenis Aŭstralion. La raporto estas longa kaj informhava, sed tie ĉie estas necese menciĝi nur la ĉefajn punktojn. La sumo de la aktivoj, (havo), estas Fr. sv. 11, 143.29. La defcito de la jaro 1924 atingis 6903. 18 fr., t.e. 1302.04 fr. pli ol la defcito de la antaŭa jaro. La enspezoj atingis 14,038 fr. pli al tiuj de la antaŭa jaro. La kresko de la enspezoj estas kaŭzita dank'al la pliboniĝo de fremda mono kaj la plimultiĝo de la membraro. La kresko de la enspezoj estas ĝojiga, kaj pruvas, ke kun bona volo la fina celo—sensŭlda ekzisto— estas atingebla. La raporto diras, inter alia La kresko de nia Asocio kiel de la movado plej elokvente vidiĝas en la Adresaro de la Delegitoj. Ni transpasis la okan milion. Pagis la regulan kotizon 8073 anoj; aldonu la 192. Dumvivaj Membroj tiam la plena cifero estas 8265. Mankas do ĝis dekmil nur 1735 anoj. Kie ekaperas esp. grupo aŭ izola propagandisto ni demandas ĝin aŭ lin pri la akcepto de la delegiteco. Dum 1924 nia varbado ĉefe direktiĝis al la trovo de transoceanaj delegitoj precipe en Afriko, Ameriko kaj Azio. Kie nia Asocio ne penetris estas Japanujo. Ni donas tiun jaron nian atenton al tiu lando, havanta 2500 organizitajn esperantistojn sed apenaŭ cent anojn de UEA! La kresko de la Delegitaro montras jena komparo: 1923, 1061 delegitoj, 6332 membroj; 1924, 1187 delegitoj, 8268 membroj. Resume ni povas diri, ke la jaro 1924 estis bona; preskaŭ normalaj kondiĉoj financaj, 8000 anoj, defcito ne grave superanta la antaŭan, ĝenerala fido en UEA ĉe la Esperantista publiko. Sed ni ne devas ripozi. Novaj taskoj anonciĝas kaj postulas atenton. Kiel en ĉiuj entreprenoj, la mallaŭdata kaj tamen ŝatata mono decidas, kio estas farebla. Imagu, se ne ekzistus UEA? Certe la movado ekzistus, sed tutcerte estus ankaŭ, ke mankus al ĝi tiu kerno, tiu fokuso, grupiganta regule la Esperantistojn, per agado efektiviginta la altan idealon de **Dro Zamenhof**.

KRONIKO.

MONT ALBERT, V. — La grupo "Espero" ankoraŭ serioze laboras. Kunveno okazas ĉiun mardon kaj la lernantoj faras bonan progreson sub la gvidado de s-ro R. T. Banham, kiu ofte faras pruvekzamenojn kaj ĉiam kaj ĉiamaniere helpas la studentojn.

TOWNSVILLE, Kvinslando. — Nenia grupo nun kunvenas ĉi tie, sed en la urbo estas kelkaj disaj Esperantistoj. Oni esperas, ke ili baldaŭ starigos grupon.

MELBURN, V. — La Melburna Societo Esperanta regule kunvenadas ĉiun vendredon. La 29an de majo, s-ro Bertram C. Ballard, B.A., lekciis pri "Iuj malfacilecoj de esperanta prononcado." La sonoj menciitaj kiel malfacile akireblaj estis "o" kaj "e"; kaj, ĝuste pro tio, ke ili estas fremdaj al Angla, oni devas lerni antaŭ ol uzi ilin, same kiel oni devas ellerni novajn vortojn por havi plenan vortprovizon. Per desegnoj la parolanto montris kiamaniere la sonoj formiĝas en la buŝo, kaj konsilis sinekzercadon antaŭ spegulo, kiel helpilon en elparolo de la sonoj. S-ro Ballard tiam prialudis du sonojn, kiuj ne devas aŭdiĝi en esperanta prononcado, nome, "er" kaj "uh," kaj montris, ke ili estas uzitaj nur kiam oni malatentas la fonetikan strukturon de Esperanto. Li finis sian interesan parolon per admono ke konstanta praktiko estas necesa, kiel ankaŭ nelaca zorgo dum oni parolas.

La dekduan de junio la Societo havis "Sally McGundy" Vesperon. La diversaj ludoj estis tre interesaj kaj plene streĉis la kapablojn de la partoprenintoj. La mono kolektita, du funtoj du ŝilingoj, estas donita al "La Suda Kruco." (Imitinda ekzemplo por aliaj grupoj, kiuj volus helpi la gazeton. Ed.)

NORTHCOTE, V. — Post trijara ekzisto tiu grupo provizore ne plu kunvenos. Entute ĝi havis 35 membrojn kaj la neznombra ĉeesto estis 20, sed ŝajne nur la persona influo de la fondinto, f-ino Ella Wheeler, povis elveki la entuziasmon de la membroj. La klubo donis sian havon, tri funtojn, al "La Suda Kruco." (Dankon. Ed.)

SIDNEJO, N.S.K. — Tri fojoj dum la pasinta monato stacio 2FC disaŭdigis Esperanton. La parolinto

estis s-ro L. E. Pfahl, kiu parolis je la 8-a kaj 23-a Junio kaj 3-a Julio. Jam tiel multaj demandoj pri lernolibroj rezultis, ke almenaŭ sola libro estas aĉetebla en Sidnejo. — Amikoj kiuj deziras sciigi pri proksimaj disaŭdigoj estas petataj skribi kiel eble plej baldaŭ al s-ro Pfahl mem, kies adreso troviĝas sur lasta paĝo. Raportoj pri sukcesa aŭskultado estos bonvenaj por kuraĝigi la sendstacion daŭrigi la disaŭdigadon.

“Wireless Weekly” raportas, ke la Senfadena Instituto de Aŭstralio, (Nova Sudkimruja filio) uzos nur Esperanton kiel helpa lingvo alilande. Ĝis nun ne estis oficiale decidita, sed oni povas atendi la akcepton tre baldaŭ.

“Sydney Esperanto Society” post kelkaj semajnoj ŝanĝos la kunvenon al “Auto House,” Castlereagh Street, Sydney. Dum junio la klubanoj ĝuis la sekvantan programon. Junio 4 — Unu el la plej interesaj paroladoj aŭdite dumlonge, estis tiu de S-ro F. Dunleavy titolitan “Vivado okcidente de l’Darling Rivero.” La priskribita distrikto lokiĝas en la preskaŭ neprodukta parto de Nova Sudkimrujo, apude de Suda Aŭstralio, kie la parolinto kelkajare loĝadis, kaj montris flankojn pri kiuj urbanoj neniam pensas. Junio 11—Konversaciaj rondoj laŭ antaŭaranĝitaj temoj. — Oni bonvenigis s-ron Lauri Laiho, bonkonata finlanda samideano lastatempe loĝinte en Melburno, kiu trapasinte Sidnejon, vojaĝis al Rabaŭl, Nov-Gineo, por tien okupi oficon. Junio 18 — Parolado de s-ro A. Auwart, estona samideano, pri “Fototekniko” klarigite de skizoj sur nigra tabulo. Junio 25—Nova dato de jarkunveno. La prezidanto, S-ro Taylor, raportinte pri la pasinta duonjaro montris ĝin kiel sufiĉe kontentiga, precipe la nuntempe kreskanta intereso inter radiuloj kaj radio-aŭskultantoj. Kvan-kam la membraro ne multe pligrandi-

ĝis, la kunlaborado kaj harmonio estis modelaj kaj ĉiudusemajnaj piknikoj plensukcesaj. La financoj ankaŭ staras pli bone, ol iam antaŭe. Li kredis, ke de nun ni povas antaŭvidi rapidan progreson ne nur en la klubon, sed disvastiĝon de nia amata lingvo ĉie. — Post voĉdono oni elektis la jenan oficistaron por la jaro 1925/26:—Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Vic-Prezidantoj: S-roj F. T. Simon, A. Auwart kaj F-ino Harwood; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl; Kasistino: F-ino V. Fairfield; Kontrolisto: S-ro D. Healy; Bibliotekisto: S-ro H. Torr kaj Protokola Sekretario: S-ro V. Rutland.

WELLINGTON, Nov-Zelando. — Nia entuziasma samideano S-ro W. H. King, klopodas aranĝi esperantan kongreson en Nov-Zelando. Nia vigla amiko opinias, ke nuntempe estas oportuna por starigi N.Z. Espon. Asocion. Ni kore esperas, ke liaj klopodoj bone sukcesos.

RECEIPTS.

Subscriptions.

Up till 29th June the following sums were received:—Kho Siang, 2/6 (12/25); Congress advts., £2/1/-; L. Griffith, 4/6 (5/26); H. A. Woodman, 4/6 (5/26); N. Higginson, 4/6 (5/26); G. McDonald, 4/6 (5/26); A. Madaraz, 4/6 (6/26); G. Mercer, 5/- (6/26); V. Korjnevsky, 4/6 (3/26); L. O’Connor, 4/6 (6/26); L. Saw, 4/6 (7/26); cash sales, 6d. The subscription and donation acknowledged last month from “R. Reidson” should be “R. Neilson.”

Donations.

Melbourne Esp. Society, “Sally McGundy” Evening, £2/2/-; Northcote Esp. Group, £3; L. Saw, 10/6; W. H. King, 10/-. (Sincere thanks. Ed.)

VITAMIN.

Nature’s remedy for physical and nervous exhaustion and disorders.

See Testimonials.

For Children and Adults.

Price Per Packet: 3/8 Posted.

Australian Agent: A. R. COHEN, 12 DERBY STRET. KEV.

HERE AND THERE.

During December last an official inquiry regarding the knowledge of Esperanto by the Antwerp Police revealed the fact that six members had a knowledge of Esperanto, seven are learning it and 102 are anxious to learn it!

A course of Esperanto for the employees of the Minerva Motor Factory was so satisfactory that a new class has been commenced.

The Universala Esperanto-Asocio wound up the year 1924 with a deficiency for the period of 9170 fr. The annual report shows the number of members according to countries. Australia with 142 members occupies the seventeenth place in a list of thirty nine. In 1924 the cost of each Jarlibro was 1.33 fr.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn jurnalajn laŭ ĉi tiu adreso — "La Sudo Kruco," Box 731 F, P.O., Elizabeth-st., Melbourne, Australia." Amerika Esperantisto, 2; Amikeco, 4; Arbeiter-Esperantisten, 4; Belga Esperantisto, 120; Bulteno Antverpena Poresperanta Propaganda Komitato, 4; Bulgara Esperantisto, 7; Holanda Esperantisto, 163/4; Heroldo de Esperanto, 31/36; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, 90a, 90b; Itala Esperanta Revuo, 4; International Language, 4; La Policisto, 32/3; La Ĵurnalisto, 1; Liberpensulo, 1; Ligilo por Vidantoj, 1; La Unuigita Tuthomaro, apr.; La Interligilo de l'P.T.T., 30; La Suno Hispana, 95/6; Oomoto, /3; Pola Esperantisto, 3; Sennacieca Revuo, 19; Sennaciulo, 29, 31; The British Esperantist, 240.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; sekretario, S-ro L. E. Pfahl, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Raciista Esperanta kaj Diskuta Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie: sekretario, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str., North Carlton, Melbourne. Kunvenejo, Temperance Hall, Russell-str., Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 62 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 agosto 1925

MORE "WIRELESS."

An extremely powerful station commenced operations in June in Madrid. The director has promised to transmit a large amount of Esperanto. "La Suno Hispana" says, "on account of its extraordinary power, greater than that of any other European station, its programmes should be heard throughout the world."

The Leipzig Radio Station broadcast the opening speeches of the German Esperanto Congress held at Magdeburg on 31st May. The speeches were conducted by microphone to a telephone line which was connected to the broadcasting station.

Twelve British stations broadcast the opening proceedings of the last British Esperanto Congress. Lord Robert Cecil, vice-president of the League of Nations, D-ro Privat, professor J. J. Findlay, and s-ro C. H. Edmonds were the principal speakers.

As a result of the recent Congress of Radio Amateurs in Paris a committee has now been formed to organise contact between the amateurs of Europe, to arrange experiments and to utilise the results thereof. The official organ is the "Radio Amator," 20 Zielna, Warsaw, which will, practically, be wholly printed in the language of the Radio amateur—Esperanto.

PITH OF RECENT CONGRESSES.

During the recent Danish Congress members visited Brandekilts, the birthplace of the famous linguist, Rusk. At the monument erected in his honour they placed a floral tribute inscribed, "To the famous son of Denmark, Rasmus Kr. Rask, who advocated an auxiliary international language."

The Sixteenth British Congress was held at Leamington, under the presidency of Prof. J. J. Findlay. Viscount Cecil sent a message to the Congress which was broadcast. It was definitely decided that the 1926 international Congress would be held in Edinburgh. The British Esperanto Association is co-operating with the Linguaphone Institute in the preparation of Esperanto gramophone records. The recording has been done by Dr. Edmond Privat. The records will include lessons, extracts from Esperanto literature, speeches, etc. It was decided to organise an Esperanto month in Great Britain and to invite s-ro Ĉe to make a propaganda tour.

The German Congress at Magdeburg was a great success. Radio played a great part, the proceedings being extensively broadcast. During the opening day telegrams were received from many parts of Germany reporting that the speeches had been so distinctly heard that the proceedings were able to be closely followed.

INSTRUU LA INFANOJN.

Rigardante la neageman eĉ kontraŭstareman sintenadon de la ŝtata kaj aliaj edukadaj aŭtoritatoj pri ia ajn internacia lingvo oni iam malesperas pri Esperanto. Pro kio tiuj timas? Jam multaj geinstruistoj en ĉiu ŝtato lernis esperanton, ja, kelkaj gajnis la britan diplomon. Ĉiuj konsentas, ke nia lingvo vere estas helpilo en lernejoj instruadaj temoj. Ĉu estas eble starigi eksperimentan kurson inter infanoj en iu urb-lernejo? Saĝe estus fari tion por montri al la nekredantoj kiel facile infanoj povas lerni, ankaŭ kiel utila estas la lernado faciligante la studadon de iuj anglaj temoj. En Anglujo, ĉe Eccles, oni faris tian eksperimenton kaj la rezultato pruvis, plej konvinke, ke la lingvo ne nur estas akceptinde sed ankaŭ vere necesa. Antaŭ la lasta Aŭstralia kongreso, sindonemaj esperantistinoj, kiuj ankaŭ sin okupadis kiel ŝtataj lernejoj instruistinoj, instruis ĉirkaŭ kvar-dek infanojn. Tiuj infanoj studadis kaj rapide lernis Esperanton tiel, ke ili prezentis teatraĵon antaŭ la kongresanoj. Tiu prezentaĵo estis bonege sukcesplena. Post tio la infanoj daŭrigis la studadon kaj nuntempe la plimulto el ili, korespondas kun infanoj de diversaj landoj, kaj samtempe vigle faras siajn lecionojn ordinarajn. Post kelke da jaroj ĉi-tiuj infanoj povos uzi la internacian helplingvon por korespondi komerce kun alilandanoj tiel, ke ili povos plibonigi siajn vivrimedojn. Ankaŭ ili povos havigi al si la plej legindajn verkojn el ĉiuj landoj, kiuj ĝis nun, por ili ne havas ian ajn valoron. Do, kial ne instruu ĉiujn infanojn el tuta nia lando? Kial puni la estantajn infanojn, kaj ankaŭ la estontajn? Kial niaj infanoj ne havu la saman oportunadon kiel tiuj de eŭropaj landoj? Por komenci la instruadon Esperantan oni sugestas ke unu du instruistoj ĉe ĉiu ŝtata lernejo starigu kurson dum lernejoj horoj—kompreneble nur se la ministro por edukado permesos tion. Certe troviĝos instruistoj kiuj ĝoje faros tion je la fino de la lernejoj horoj. Oni raportas ke jam kelkaj samideanoj gvidas kursojn inter la infanoj. Kun plezuro la la Suda Krucio ricevos raportojn pri tiuj klopodoj.

RESUMO PRI MIAJ ĜISNUNAJ TRAVIVAĴOJ EN NOVA GINEO.

(de Lauri Laiho).

En la frua mateno la 26an de Junio nia ŝipo "Mataram" envelveturis la havenon de Rabaul. La vidaĵo, kiam oni envenas de la maro post naŭ-taga unutona vivado sur vaporŝipo, estas pitoreska; Rabaul troviĝas en kurbaĵo de golfo, en la valo de tri vulkanoj. La vulkanoj ne funkcias jam de longa tempo, sed malfortaj tertremoj estas tre oftaj (ankoraŭ ne okazis iu dum mia ĉeesto), kaj de la pinto de la plej alta eliĝas de tempo al tempo malagrabla haladzo de sulfuro.

Rabaul estas la ĉefurbo de Mandata Teritorio de Nova Gineo, nun sub la rego de Aŭstralio (antaŭ la milito ĝi apartenis al Germanujo). La urbo kuŝas ĉe la nordo pinto de insulo Nova Britujo. La civilizita loĝantaro konsistas el 500 blankuloj, krom tiuj loĝas en la urbo ĉirkaŭ 1,000 da ĉinoj, kaj nekalkulebla nombro da indiĝenoj, plejparte kanakoj kaj melanesianoj.

Mia venonta mastro estis ĉe la ŝipbordo kun sia nigra kanako kaj aŭtomobilo, kies direktisto estis malajo. Ni veturis rekte al nia loĝejo, kiu troviĝas en distanco de 10 min. de la urbo. La loko estas la plej bona en la ĉirkaŭaĵo, ĉar starante sur la pinto de monteto (ne tamen unu el la vulkanoj, kvankam tre proksime al tiuj) tie ĉiam ekzistas iom da trafluo kaj blovo, tiel ke la varmego ne ĝenas egale al tio malsupre en la urbo. Pro tio la loko estas okupita plejparte nur de respektataj urbanoj, kaj nomata aristokrata antaŭurbo Namanula.

Mia plej unua okupo estis vizito al ĉina tajloro por mendi kelkajn blankajn vestaĵojn, kiujn viroj ĉi tie ekskluzive uzas. Ordinare oni vestas sin tage nur en pantalonoj kaj ĉemizo, vespere kaj kiam onifaras vizitojn, oni surmetas ankaŭ blankan jakon. La vestaĵo do ne estas peza.

La loĝejoj estas malpezaj, sur unumetraj kolonoj konstruitaj bangalojn la kruirejo kaj banejo ordinaraj en aparta konstruaĵo. La kanakoj faras ĉiun laboron: purigas la ĉambrojn, kuiras la manĝaĵojn kaj lavas la vestojn, kiu lasta okupiĝo certe ne estas malgrava, ĉar la mastro de-

mandas ĉiumatene puran ĉemizon kaj preskaŭ ĉiu-tage ankaŭ paron da amelumitajn pantalonojn. La fizika flanko en la vivmanieroj de blankuloj en tropiko estas nepre pura, kiun saman oni ne ĉiam povas diri pri la morala flanko.

La drinkejoj en la urbo estas malfermataj ĝis malfrua vespero, kaj ankaŭ multe vizitataj. Plejmulto el la homoj ĉi-tie havas emon drinki alkoholaĵojn, eĉ doktoroj rekomendas trinki botelojn da biero ĉiu-tage. Sed tio ne sufiĉas; ekzistas homoj, kiuj drinkas dek botelojn da biero kaj unu botelon da viskio ĉiutage. Mi ankoraŭ ne alkitimiĝis eĉ al la doktora ordono; ankaŭ la kininon mi ankoraŭ ne komencis ĝui.

La homoj ne multe promenadas en tiu ĉi lando: preskaŭ ĉiu dua homo posedas aŭtomobilon. Ordinare oni veturas per aŭtomobilo sabatvesperon al iu plantejo de konatulo, kaj revenas malfrue en la dimanĉo. La lastan sabaton mi veturis en la lokon nomata Kokopo, en unuhoro distanco de Rabaul, por renkonti mian karan samideanon s-ron Maŭrice Hyde—kiu preterdirante estas la plej lerta esperantisto en la suda duonsfero—kun kiu mi pasigis la du tagojn tre agrable. Pitoreska loko: mi admiris la sunleviĝon de la balkono de mia hotelo inter belaj palmoj. Estado en tia hotelo en Europo estus multekosta. De tie ni veturis al plantejo, kie estis aranĝita Sing-Sing, festa danco de indiĝenoj, kiun partoprenis ĉirkaŭ 200 paganoj, vestitaj en kuriozaj kaj amuzaj ornamaĵoj. Ili konsistis el kanakaj, melanesianoj, negrojn de Solomon insuloj, kanibalojn k.t.p. Tiuj du tagoj estis simple grandiozaj al mi: pitoreskajn pejzaĝojn kien ajn oni rigardis, tropikajn kreskaĵojn, belegajn turistajn vojojn tra palmo-arbaregoj ĉe la marbordo. Tromulte por unufojo!

La naturo ĉi tie estas tute malsimila al tiu en Aŭstralio: sekeco neniam ĝenas. Nun devus esti la

seka periodo, sed pluvetas preskaŭ ĉiu-tage. Nenia strata lumigo, ekzistas, sed kiam estas lunlumo, oni ne deziras ion plu, tiel bela kaj luma ĝi estas. Ekzistas alia natura lumigilo ankaŭ, tiu de lumomuŝoj, kiuj kelkfoje povas aperi en miloj. La suno leviĝas mirinde bruleflava je la sesa horo kaj malleviĝas preskaŭ je la sama horo vespere.

La blankuloj ĉi tie estas plejmulte oficistojn por aŭstraliaj oficejoj kaj plantejoj. Ekzistas ankaŭ kelkaj privataj plantejoj, i.a. unu plantejo de kokosa palmo, posedata de finno; mi ne konatiĝis ankoraŭ kun la viro, kiu laŭdire estas edzigitita kun duonkolora virino. La virinoj (blankaj) ne estas tre multnombraj en la loko, kaj tiuj malmultaj estas preskaŭ senescepte edzinoj. Cetere mi kredas ke tia ŝanĝo estas bona por juna viro: iom seriozigas . . .

NOVA LIBRO DE NITTI.

Samtempe kun la aliaj ĉirkaŭ 15 nacilingvaj tradukoj de la plej nova verko de Francesco Nitti, (iama ministrara prezidanto itala), speciala Esperanto-eldono aperos sub la titolo "La Paco," (aro da paroladoj faritaj en Skandinavio kaj en Svislando). La tradukaj laboroj nuntempe estas farataj rekte el la itala originalo de du lertaj esperantistoj. La diplomato kaj pacifisto mem instigis la eldonejon de la Frankfurter Societats-Druckerei, Abteilung Buchverlag, Frankfurt, fari specialan Esperanto-tradukon, por kiel eble plej rapide konatigi siajn ideojn al la tuta mondo.

SUPERFLUE.

Sinjinino, al la nove dungita kuiristino: "Ĉu vi lavis la fiŝon antaŭ ol vi kuiris ĝin?" "Ne, sinjinino moŝto, pro kio lavi ĝin? Ĝi ja pasigis sian tutan vivon en la akvo!"

HAROLDO PUDNEY.

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM Aŭ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Asocio" kiu havas Esperantan fakon ĉe Hawthorn, Viktorio, renkontiĝis por ĝui muzikan vesperon je la 15a julio.

La programeroj konsistis el kantoj, violonaj soloj, amuzaj konkursoj, dancado, k.t.p., kaj ĉiu ĉeestanto, ŝajne, tre ĝuis la diversajn erojn. Ĉirkaŭ dudek kvin ĉeestis.

KOMISIONO PRISENDANĜERO KAJ INDUSTRIA HIGIENO.

La internacia Komisiono pri sendanĝero kaj industria higieno havis sian unuan kunsidon en la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo, la 9—11 majo. Ĝi kunvenigis spertulojn el Belgujo, Francujo, Germanujo, Granda Britujo, Italujo, Nederlando kaj Svisujo.

La Komisiono ekzamenis problemojn de industria sendanĝero nur ĝis kiom ili rilatas al industriaj entreprenoj, doko kaj konstruado, ne enkalkulante minojn, transportadon kaj agrikulturon.

Oni diskutis pri la redaktado sur internacia bazo de studoj pri kelkaj problemoj rilataj al la antaŭforigo de akcidentoj. Oni opiniis, ke tiaj studoj multe helpus al progreso je antaŭrimedoj kontraŭ akcidentoj.

La Komisiono balotis rezoluciojn pri la enkonduko en naciajn leĝdonon de la principo de industria sendanĝero, pri punoj por neobservo de reguloj starigitaj tiacele kaj pri kunlaborado de la diversaj organizaĵoj sin okupantaj pri asekuro kaj antaŭforigo de akcidentoj.

La membroj de la Komisiono vizitis, gvidate de s-ro Tzaut, direkto de la Svisa Nacia Akcidentasekura Kaso, du fabrikejojn en Ĝenevo, por vidi la metodojn uzatajn por sin protekti je ligno-ellaboranta maŝinaro.

—Informservo de la Internacia Laboroficejo.

MORTO DE FAMA LINGVISTO.

Antaŭ kelkaj semajnoj mortis en Takoma (Vaŝingtono) profesoro Karl J. Arnell, kiu ellernis 53 lingvojn. Krom la mortintaj lingvoj de la mondo li sciis la vivantajn, komenco de la lingvo de eskimoj kaj finante per tiu de afrikaj hotentotoj.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—Laŭ nova programo por la sekvanta jaro, la anoj de la Melburna Esperanta Societo ĝuis la jenajn erojn dum la pasinta monato. Julio 17. Post la kutimaj aferoj de la grupoj, la klubanoj rakontis amuzajn anekdotojn, por helpi la pli fluan paroladon de la lingvo. Julio 24. Ĉi tiun nokton oni hazarde elektis la nomojn de kelke da ĉeestantoj, kiuj poste mallonge parolis pri temo, mem-elektita. Sendube la afero donis bonan okazon ekzerci sin en la parolado antaŭ aliaj. Julio 31. Oni kantis, unuope kaj ankaŭ kune, sekvis deklamojn kaj pluaj kantoj. Vere belsonaj estas la Esperantaj kantoj.

SIDNEJO, N.S.-K. — Por lia kvara radio-parolo, ĉe stacio 2FC, la 28an Julio, S-ro Pfahl elektis paroli pri "Internacia Reklamado per Esperanto." Pro ĵustatempa vizito de la Usona militŝiparo la parolinto invitis Esperantistajn marsoldatojn al la klubejo.

Oni raportas, ke antaŭaj radio-paroloj estis bone auditaj ne nur en Nova Sud-Kimrujo, sed ankaŭ en Viktorio kaj Novzelando.

Notinda parolado dum pasinta monato estis "Historio de Sidneja Esperanto-Societo" de la prezidanto, S-ro F. V. Taylor, kiu zorgoplene preparis la historion de la jaro 1909, antaŭ ol nenio estas definitive konata. La historio, kune kun dokumentaro, nun estas konservata kaj oni penas kompletigi la kolekton pri la fruaj tagoj de Sidneja agadoj.

Pro neantaŭvideblaj cirkonstancoj la Sidneja societo ne transloĝiĝis al la adreso lastmonate avizita, sed al "Rawson Chambers," Rawson Place, ĝuste kontraŭ la malnova ejo.

PERTH, W.A. — Korespondanto skribis dirante, "Ni havis kurson, sed pro malsano kaj aliaj malhelpaĵoj ĝi ĉesiĝis." Sendube, la ĝis nun agemaj samideanoj post nelonge starigos aliajn kursojn kaj grupojn.

HOBART, Tas. — La jara kunveno havis lokon la 14an de julio. La rutinaj aferoj ricevis atenton kaj oni elektis la sekvantajn oficistojn, Prezidentanton, F-ino C. M. Hannaford, Sekretariinon, F-ino A. Beckett.

HAWTHORN, V. — La anoj kaj gastoj de la "Katolika Internacia

HERE AND THERE.

M. Leon Poncet obtained his medical degree recently for a thesis on "Vaccination for Typhoid and Cholera." Dr. Poncet obtained all his information through the medium of Esperanto. He wrote to the U. E. A., delegates of several countries, (including Mr. Ballard, chief delegate in Australia) and they obtained the latest information from official sources and forwarded it. The examiners enthusiastically expressed their appreciation of the value of Esperanto and determined to recommend its further use in medical literature.

An old time Esperantist, Mr. C. W. T. Reeve, who became an advocate for Ido has made an application to be again admitted to membership of the British Esperanto Association. In explanation Mr. Reeves says that contrary to his expectation the improvements represented in Ido have not helped towards the adoption of an international language. That and other systems do not afford the traveller and correspondent the opportunities to demonstrate to so full an extent the possibilities of an artificial language as does Esperanto which is now so widely known. He says that Esperanto has proved itself to be nearly the very artificial language the public want, supposing that they want an artificial language at all. The capacity for expansion and improvement of Esperanto should satisfy individuals who are enthusiastic for improvements. It amounts to this—we must go abroad and use the language, and use it again and again by writing in it on subjects of every day concern.

The "Oficiala Jarlibro de la Esperanto Movado, 1925," (U.E.A. Yearbook), has now reached members. It contains much valuable information.

STENOGRAFIO POR ESPERANTISTOJ.

De stenografiistino el Nederlando ni ricevis la jenan sciigon: La delegito de UEA en Dordrecht, -ro B. P. Roubos baldaŭ sendos en la mondon novan stenografisistemon por Esperantistoj. La sistemo estas neŭtrala. Ĝiaj signoj estas elektitaj laŭ la idiomo Esperanta. Petantoj ricevas senpage la unuan lecionon kun bezonaj informoj.

ESPERANTO DESIRED IN SCHOOLS.

Early last month a deputation waited on the Minister for Education of South Australia, with a request that Esperanto be taught in the public schools of the State. The Rev. B. Wibberly and Rev. A. C. Stevens, on behalf of the C.O.P.E.C. Association, urged the claims of Esperanto and the Hon. P. McM. Glynn, a former Minister in the Federal Government, Messrs. Waterman and Urhlaub, well known Esperantists, and Mr. R. B. Caldwell, president of the Wireless Association, each advanced arguments in favour of the request being granted. The Minister, in reply, said that the deputation had given him much information. He would consult the Director of Education in the matter, he himself could not say whether the introduction would be advisable. He suggested a deputation to a Federal Minister, and implied that he was not in sympathy with the request.

"C.O.P.E.C." FAVOURS USE OF ESPERANTO.

The following resolution was submitted to the recent conference of this movement, (Conference on Christian Politics, Economics and Citizenship), by the International Relationships Study Circle was carried unanimously:

(a) That the C.o.p.e.c. movement in South Australia will support a request representing the whole of Australia, urging the Federal Government to petition the League of Nations to approve of an international Auxiliary Language and to name a date when it will be adopted in all debates.

(b) That the Executive be authorised to take action to give effect to this resolution.

It is suggested that instead of approaching the Federal Government a petition to the Federal Parliament should be circulated for signature throughout Australia. The General Secretary, Mr. J. Charles Genders, Town Hall Buildings, Pirie Street, Adelaide, would be glad to get in touch with all who are interested in the adoption of an international auxiliary language. Secretaries of groups in Australia and New Zealand would help by sending information and suggestions to Mr. Genders.

bro pri la telefona reto de Paris eĉ ne enhavis cent abonantojn, kaj kiam oni atendis, instaligi aparaton ĉe si, ĝis kiam la aliaj estus komencintaj.

Nu bone! La samaj hezitoj markis la komencojn de Esperanto; sed de post kiam ĝi eniris la mediojn, kiuj havas praktikan intereson nepridis-kuteblan por ĝin utiligi, ĝiaj progresoj fariĝis rapidaj.

Jam la komerco eksporta kaj importa ne havas la rajton ignori ĝin; ĝi baldaŭ fariĝos same necesa por ĝi kiel la telefono.

Jen kion komprenis nia iama prezidanto s-ro Pascalis, kiam li esplorigis antaŭ kvar jaroj la demandon pri helpa lingvo

Mi jen vidas kompetentajn reprezentantojn de komerco kaj industrio, alvenintajn el ĉiuj punktoj de la mondo. Mi salutas en ili la delegitojn de 155 komercaj ĉambroj kaj sindikataj ĉambroj aŭ industriajn firmojn apartenantajn al 32 diversaj landoj.

Tiu diskutoj, kiuj okazos en unu sola lingvo inter la reprezentantoj de 32 nacioj, estos denova rimarkinda demonstracio pri tio, ke estas finigonta la epoko de internaciaj kongresoj, kie la diskutoj bezonigantaj multenombrajn interpretistojn estas tiom penigaj.

S-ro Leonard, parolante en Esperanto, informis ke la ministro de komerco ĵus rekonis Esperanton kiel klaran lingvon por internaj telegrafaj rilatoj, kaj ke la registaro proponos la samon por la internacia telegrafa uzado dum la proksima Konferenco de Internacia Poŝta Unio.

LA AKCEPTO ĈE "LES ECHOS."

Parolado de D-ro Fruictier, sekr. de "Les Echos":—Karaj samideanoj mi ne volas paroladi longe: vi certe jam aŭdis multajn paroladojn pli lertajn ol la mia kaj mi timus tedi vin, ripetante sennecese tion, kion aliaj jam diris al vi. Tamen, mi deziras insisti pri unu punkto, kiu rilatas al la propagando kaj estas laŭ mia opinio aparte grava. Tio estas, ke, se ni volas ke nia movado sukcesu, ni devas senlace pruvadi al la mondo, ke Esperanto estas ne nur uzebla aŭ uzata, sed uzinda. Kaj per tiu vorto "uzinda" mi celas, ke ni devas elpruvi al la indiferentuloj, ke ilia tuja, materiala intereso estas lerni

INDUSTRIALISTS CONFER IN PARIS.

This Conference was a remarkable demonstration in favour of Esperanto. It is a matter for regret that, through lack of space, the merest summary of the proceedings can be given. It was decided to endeavour to introduce the instruction of Esperanto, first as an optional subject, then as obligatory, in scientific and technical schools; to petition the League of Nations to actively advocate it; to recommend all societies to have classes in their schools, to print articles in or about Esperanto in their publications; that they adopt Esperanto as a language to be used at congresses. International organisations, official and otherwise, are requested to use Esperanto in their offices and for correspondence, and after successful use to ask their governments to also use Esperanto. Publishers, especially those issuing scientific and technical periodicals, are requested to issue Esperanto editions of valuable articles, to use Esperanto in their commercial affairs and to facilitate the publication of the documents of the Esperanto Science Association. Scientists technicians and industrial firms and associations are asked to require their staffs to learn Esperanto to themselves use it in their foreign correspondence and to state on their letterheads and envelopes that they use Esperanto. Well thought out means to attain these ends were in each case suggested and fully explained.

ELTIRAJO EL PAROLADOJ.

S-ro Kempf, prezidanto de Komerca Ĉambro de Paris, okaze de la malferma kunveno de la Komerca Kongreso diris:—

La intereso, kiun Esperanto prezentas por la internacia komerco, estas konsiderinda, ĉar tiu ĉi lingvo permesas, je prezo de minimuma peno, korespondi ne nur kun aĉetantoj aŭ vendantoj de unu sola lando, sed kun ĉiuj merkatoj de l'mondo.

Tiu ĉi lingvo, estas vera kodo de korespondado kaj de lingvaĵo internacia. Jen nova rimedo, kiu povas doni grandajn servojn sub la kondiĉo, ke ĉiu faru la malgrandan penon necesan por ĝin lerni. Sed mi rememoras pri la tempo, kiam la jarli-

kaj uzi Esperanton. Mi estas jam malnova esperantisto—mi tute ne fieras pro tio ĉi—sed ĉar mi lernis la lingvon jam antaŭ dudek kvin jaroj, ĉar mi partoprenis en la klopodoj de niaj plej famaj pioniroj, ĉar mi vidis la supreniradon de nia lingvo post nia unua kongreso en Bulonjo kaj—bedaŭrinde—la malsupreniron post la disiĝoj, kiuj aperis inter ni, mi hodiaŭ konkludas, ke la sola rimedo altiri al ni la indiferentulojn kaj reteni ilin en niaj vicoj estas, disvastigi nian lingvon antaŭ ĉio inter profesiaj fakuloj por tuj doni al ĝi praktikan utilecon. Sendube la ĝenerala propagando estas necesa; krei propagandajn grupojn, malfermi ĝeneralajn kursojn, organizi kunvenojn, festojn, korespondadon, interŝanĝadon de ilustritaj poŝtkartoj, ktp. estas bonege. Sed tio ne sufiĉas: se ni ne organizas nian aferon tiamaniere, ke Esperanto efektive servu tuj al tiuj, kiuj lernas ĝin, fatale venos tago, kiam la entuziasmaj malvarmiĝos, la personaj disiĝoj aperos, la gramatikaj aŭ vortaj disputoj naskiĝos, kaj la plej fervoraj partianoj de nia afero senkuraĝiĝos kaj forlasos nin.

Tial, karaj, samideanoj, mi kredas, ke la estonto de nia afero dependas de nia sukceso inter la fakuloj. Tie ĉi, ni estas inter komercistoj: ni do estas ĉiuj praktikaj homoj, kiuj kompreneble havas ankaŭ sian idealon, sed antaŭ ĉio devas difine perlabori sian vivon. Se oni diros al ni kaj al niaj kolegoj tra la tuta mondo: "Lernu Esperanton por la bono de l' Homaro kaj de la venontaj generacioj!" tre certe kelkaj sindonemuloj aŭskultos tiun parolon kaj aliĝos la movadon, sed ili ne estos multaj kaj ilia fervoro ne povos daŭradati ĉar, kiel vi scias, komercisto ne havas multe da tempo dediĉebla al alia afero ol lia komerco, kaj vole nevole tiun ĉi aŭ alian tagon liaj profesiaj zorgoj devigos lin forlasi la propagandon. Sed oni pruvu al ni, ke per Esperanto ni povas tuj trovi klientojn, ŝpari je la preso de katalogoj, malmultigi niajn tradukajn elspezojn, pli facile trovi eksterlande la komercaĵojn, kiujn ni bezonas, unuvorte—ŝpari tempon kaj gajni monon. Ĉu vi ne kredas, ke ĉiuj komercistoj, vidinte tion ĉi, ne rapidos lerni la lingvon aŭ almenau ne ordonos al siaj helpantoj lerni ĝin, por elteni la konkurencon de siaj pli progresemaj esperantistaj kolegoj?

Tial, karaj samideanoj, mi diros al vi en la fino: ni, komercistoj, ni, praktikuloj, ni devas doni al ceteraj fakuloj, al scienculoj, al laboristoj, al policistoj ktp., kiuj jam fake organizis sin por la disvastigo de Esperanto, la ekzemplon: ekzemplon de praktika, efika organizado, ekzemplon de tuja kaj ĉiama uzado de la lingvo por niaj profesiaj celoj, ekzemplon de senlaca persona propagandado inter niaj samfakuloj tra la tuta mondo. Se el la nuna internacia kongreso vi returnas hejmen kun tia decido en via volo, mi ĝoje povos diri, ke Esperanto faris novan grandan paŝon antaŭen sur la vojo al triumfo!

OUR SUPPORTERS.

S-ro A. R. Cohen: "My interest remains wish you every success."

Miss A. Ryan, State School, Silkstone, Queensland: "I hope this link with scattered members may continue."

S-ro N. Gaye: ". . . . my subscription enclosed, with best wishes."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ ĉi tiu adreso — "La Suda Kruco," Box 731 F, P.O., Elizabeth-st., Melbourne, Australia."

Amikeco, 5; Arbeiter Esperantisten, 5; Austria Esperantisto, 6; Belga Esperantisto, 121-122; British Esperantist, 243; Brazila Esperantisto, 1/3; Bulgara Esperantisto, 8, 9; Informservo de la Internacia Labor-Officejo, 91c, 91d, 93b, 93c; Bulteno Antverpena, 5, 6; Esperantista Junularo, 26; Heraldo de Esperanto, 37 ĝis 47; Hungara Esperantisto, 74; International Language, 5, 6; Le Monde Esperantiste, 138; Oomoto, 5; La Ora Epoko, 12; La Progreso, 6-7; La Revuo Orienta, 5; La Suno Hispana, 97; La Unigita Tuthomaro, 5, 6; Literaturo, 26; Pola Esperantisto, 4; Svenska Esperanto Tedningen, 5.

Nokte venis el gastejo ebrulo kaj demandis fremdulon irantan sur la strato, ĉu tio estas la suno aŭ la luno, kiu lumas sur la ĉielo. La fremdulo diris: "Pardonu, sinjoro, mi ĉi tie mem estas fremda."

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 64 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 oktobro 1925

THE XVII CONGRESS.

Tiam tre maljuna virino, blankhara kaj kun sulkita frunto venis, apogante sin sur sia lambastono. Kiam ŝi ekvidis la mortinton, ŝi tiel konfuziĝis ke, lasante fali sian lambastonon, ŝi falis teren sur la mortintan viron. Nur post iom da tempo ŝi trankviliĝis. La maljunulino estis la fianĉino de la mortinto. Si estis la sola persono, kiu ankoraŭ memoris lin. Ŝi rakontis kiel ĉio okazis. La ĉeestantoj estis treege kortuŝiĝintaj. Ili vidis en la maljuna virino la ateston, ke dum la diversaj ŝanĝoj de la mondo, nenio estas tiel konstanta kiel la fidema amo.

La fidema maljunulino estis la sola, kiu havis ian rajton pri la mortinto. Tiun oni portis al ŝia hejmo, kaj ŝi ŝargis sin pri la tuta zorgo de lia entombigo. Kiam la tombo estis preta, kaj la minlaboristoj venis por tien lin porti, ili trovis lin ornamita, kaj kun tiu koltuko, kiun lia fianĉino konservis kiel memoron de feliĉaj junecotagoj, ĉirkaŭ lia kolo. Si mem,

solenvestita tiel, kiel por edziĝo, akompanis lin al la tombo. En ŝia koro ŝi sentis, ke tiu ĉi vivo estas nur la tempo de pretigado por la eterneco, kaj ŝi venkis la timon al la morto per fido al li, kiu estas la releviĝo kaj la vivo.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Kara amiko,

Eble vi iam aŭdis pri la gigantaj arboj de Kalifornio, sed ĉu vi scias, ke la kronikoj pruvus, ke iuj el la plej grandaj arboj iam vidataj estis trovitaj en la arbaroj de Aŭstralio? En nia lando estis eŭkaliptaj arboj, kies alteco atingis 386 futojn. Kiam la arbaristo faligis tian arbon li havis sufiĉe da ligno por konstrui domon el dek ĉambroj kaj ankaŭ fari la tutan meblaron necesan por ĝia interno. El semo eĉ pli malgranda ol la proverba sinapo semo povas kreski arbo pli ol 150 futojn alta. El la folioj de la eŭkalipto oni povas ekstrakti tre valoran medicinan oleon, kiel ankaŭ tre delikatan parfumon. Abunda akvo estas tre necesa en Aŭstralio kaj oni nun konstatas, ke tio povas esti certigata per la konservo de niaj arbaroj. Kiel provizon por siaj necesoj ĉiu lando devus posedi naturajn arbarojn ampleksantajn dudek procenton el ĝia tuta areo. Nur ses procento el la areo de Aŭstralio estas kovrata de arbaroj nuntempe, sed, ĉar la popolo jam nun studas la aferon, sendube la procento altiĝos post nelonge.

Nia estinta Federala Guberniestro, Lord Forster, lastan monaton aŭdiadis nin post kvinjara deĵorado inter ni. En unu el siaj lastaj paraladoj li citis statistikojn, kiujn eĉ ne ĉiu Aŭstraliano scias. Pro tio ke ili estas interesaj mi aldonas ilin, ĵene.

Proksimume sesdek procento el la domoj en Aŭstralio estas okupataj de la posedantoj.

La sumo de 174,000,000 funtoj estis deponita en la ŝpar-bankoj de 4,000,000 personoj.

Ne malpli ol 3,000,000 personoj havas ŝparmonon en la banko.

Preskaŭ 2,000,000 personoj posedas asekuraĵon.

En Aŭstralio troviĝas pli ol 27,000 mejloj da fervojoj, 400,000 mejloj da vojoj kaj 240,000 aŭtomobiloj registritaj.

Estas 16,500,000 akreoj kulturigitaj, kiuj valoras pli ol 81,000,000 funtojn.

La aŭstralianoj posedas 13,500,000 bovojn kaj 80,000,000 ŝafojn. Aŭstralio posedas duoble pli multe da ŝafoj ol iu alia lando, la unuigitaj ŝtatoj de Ameriko havas duan lokon, sed posedas nur duonon de tiu nombro. La valoro de la rikoltoj kaj lano dum la jaro 1923-24. estis 104,000,000 funtoj la farmobienaj produktaĵoj, 42,000,000 funtoj kaj la minaĵoj 22,000,000 funtoj.

Lastan jaron funkciis en Aŭstralio 20,000 fabrikejoj kiuj donis laboron al 430,000 dungitoj kiuj ricevis 77,000,000 funtojn kiel laborpagon.

Kun bondeziroj, mi restas,
Sincere via, Karlo Madrigalo.

LA KROKODILBIRDO.

Estas ia pluvio, kiu vivas en interesa kuneco kun la krokodilo. Ĉi tiu birdo havas sian hejmon sur la sablajoj de la Nilo, kaj ĝi ofte ripozas sur la dorso de krokodilo de kie ĝi forpikas la hirudojn. Je ĝia ofico de hirudkaptisto ĝi ofte trovas sian vojon en la buŝon de la rampaĵo, kiu estas ĝenerale malferma, kiam ĉi tiu ripozas en la sunbrilo sur sablaĵo. Okazas iam, ke la krokodilo ekdormas kaj la bŭsego fermiĝas, tiel malliberigante la birdon. La birdo tuj pikas per siaj kornaĵoj spronoj la krokodilon por refreŝigi ĝian memoron kaj la rampaĵo tiam malfermas la buŝegon kaj liberigas sian favoran hirudkaptiston. Ĝi funkcias ankaŭ kiel observanto por la malpli zorgemaj kreitaĵoj, per sia stranga bleko de "zik-zak" avertante ilin pri la alproksimiĝo de ĉio kion observas ĝiaj suspektaj okuloj.
—E. Thomas, en Heroldo.

NEKROLOGO.

La 20 julio mortis en Paris post operacio baronino de Menil, edzino de nia altŝatata samideano, komponisto de "La Espero." S-ino de Menil estis fervora esperantistino: antaŭ la milito ŝi estis komitatanino de la Pariza grupo kaj prezidantino de la "Esperantistaj Teoj," post la milito ŝi okupiĝis pri nia movado en la romkatolikaj medioj. Al s-ro de Menil ni prezentas niajn plej sincerajn kondolencojn.—Heroldo:

LA MEVO.

(Fama rusa kanto)

Ruĝiĝas mateno . . . heliĝas aero. —
Al suno rapidas la mevo vekita:
Ĝi krias, ĝi ĝojas pri kara libero . . .
Per kisoj de l' sun' estas ĝi orumita.
Ekpafo! finiĝis feliĉo fantoma . . .
En lago tremetas la mevo, mortante.
Pro distro ĝin vundis ĉasisto sen-noma . . .
Li lasis la birdon, jam ĝin forgesante.
Kaj kiel la mevo, belega knabino
Vivadis kviete ĉe lago trankvila . . .
Ŝi ĉion oferis al amo sunbrila.
Kaj kiel pro ŝerco pereis la mevo,
Jen estas pro ŝerco la koro rompita,
Jen estas rompita por ĉiam la revo
Espero malestas en viv' noktigita . . .
—Esperantigis Mikaelo Maliŝev en "Heroldo."

ĈINOJ INSTRUAS ESPERANTON AL INFANOJ.

La Pekina Esperanto-Kolegio fondis en Aprilo la popolinfanan elementan lernejon por malriĉaj infanoj. Instruado estas senpaga, instruistoj estas studentoj de P. E. K., kiuj senpage liveras lernolibrojn al infanoj. Bonvoluloj monoferas. La direktoro estas studento Dancreal Van. Esperanto estas en la programo de la 2-a kaj 3-a klasoj. La lernejo havas tri klasojn po 45 gelernantoj. Oni ankaŭ klarigas al la infanoj la Esperantismon, oni instruas pri paco kaj frateco. Krom Esperanto oni instruas kantadon, desegnadon, aritmetikon nacian lingvon kaj gimnastikon. Kiu interesas pri la laboro de P. E. K., tiu skribu al s-ro D. Van, direktoro de la elementa lernejo, Peking, Pekina Esperanto-Kolegio, Hinujo.
—Inocento Seriŝev, en "Esperanta Junularo."

"Radio Revista," Buenos Aires, is publishing lessons in Esperanto and often contains interesting articles about it. S-ro Repto, who attended the Radio Congress in Paris, is an ardent Esperantist.

CIU ESPERANTA POŝTAJO KIEL PROPAGANDILO.

S-ro Charles G. Stuart-Menteth, 31 Upper Bedford place, London, skribas—“Mi volus proponi, ke ĉiu Esperanta poŝtaĵo estu distingebla per la jenaj rimedoj; se por alilando skribu geografiajn nomojn kaj numeralojn en grandaj literoj. Adresoj kie la stampado ne difektos ilin. Nur unu poŝtmarko en la ĝusta loko. Papero kiel eble plej malpeza kaj malampleksa, kompreneble kun sufiĉa afranko. Poŝtsendu frue en la mateno, aŭ je malplej okupata tempo de poŝtoficistoj, por ke ili havu ŝanĉon rimarki la Esperantistaĵon.”

VERA OKAZINTAJO.

Dum la inflacia tempo en Germanlando eksterlandano intencis eluzi la valuton por li favoran kaj aĉetis en bavara urbo proksime de la limo belan vestaĵon por kelkaj malmultvaloraj moneroj. Kun la pakaĵo sub la brako li kontente alrapidis la stacidomon kaj eniras kupeon. Kiam apenaŭ la trajno estas ekveturanta, li retiriĝas en la necesejon por sin alivestigi kaj per tio ruze trompi la doganistaron. Sian mizeran, malnovan vestaĵon li elĵetas tra la fenestro kaj la novan li estas surmetonta. Sed, ho ve! Kiam li malfermas la pakaĵon, jen mankas la pantalono.

RELIGIO EN JAPANUJO.

La partoprenantoj en la fakkunsido de religiistoj, okaze de la XIIa Japana Esp. Kongreso akceptas en la nomo de Oomoto'a Esperanto-propaganda Asocio kaj Japana Kristana Esperanto-Federacio jenajn rezoluciojn kaj rekomendas: 1e, Ke ĉiu religia grupo en Japanujo lernu kaj disvastigu Esperanton; 2e ke, la instruistoj de dimanĉaj lernejoj propagandu Esperanton inter siaj kaj aliaj lernantoj; 3e la religiaj gazetoj kaj ĵurnaloj uzu esperantigitajn religiajn proprajn nomojn; 4e la ekzistantaj kaj fondotaj grupoj religiaj kunlaboru por la komuna celo de esperantismo kaj klopodu fondi eventuale Tutjapanan Federacion de religistoj Esperantistoj. [Revuo Orienta.]

OUR SUPPORTERS.

S-ro G. Snowdon, Seymour—“ . . . wishing the little paper further success. I congratulate Mr. Rawson and the fraŭlineto on the 3LO talk. Hope talks will be continued.”

Mrs. F. Livy, Blackwood—“I wish Suda Kruco every success.

S-ro J. Mader, Hikurangi, N.Z. —“Kun espero mi rigardas antaŭen ĝis la tempo kiam nia ĵurnaleto iom kreskos. Estas certe multaj spertaj Esperantistoj kiuj kapablas kunlabori por fari tion. Dume mi deziras al vi kaj nunaj laborantoj plej bonan sukceson.”

Mr. E. M. Wallace, Cunderlin, W.A. —“As an isolated and self taught Esperantist I am thankful that the ‘Suda Kruco’ has not been discontinued. I send my subscription herewith and wish the paper continued success.”

Mr. F. Paulsen, Kingaroy, Queensland.—“I wish the Esperanto movement and its paper every success. I enclose my subscription.”

Readers will regret to learn that Miss E. Alleyne Sinnotte, F.B.E.A., authoress of “Lilio,” one of the most proficient Australian Esperantists, has latterly been in very indifferent health and her sight is now so bad that she has to greatly restrict her reading. We extend our sympathy and hope that she may speedily be restored to health.

RECEIPTS (SUBSCRIPTIONS).

Up till 3rd November the following sums were received, (the figures in brackets indicate the month and year to which payment is made):—W. T. Middleborough, 4/6 (6/26); F. T. McArdle, 5/- (9/25); C. Caine, 4/6, (6/26); H. M. Leighton, 4/6 (6/26); M. Helm, 4/6 (6/26); J. Mader, 5/- (7/26); E. A. Sinnotte, 2/3 (12/25); —. Padgham, 4/6 (9/26); F. Halliday, 9/- (7/27); J. A. Hodges, 4/6 (6/26); A. Moyle, 4/6 (6/26); A. H. Slade, 10/- (7/27); G. Snowdon, 4/6 (4/26); F. Livy, 4/6 (12/25); F. Barr, 4/6 (10/26); F. Paulsen, 5/- (8/26); E. M. Wallace, 5/- (7/26).

ALIA LIBRO DE NITTI.

La Frankfurter Societats-Druckerei, skribas:—La Esperanto-eldono de la libro de Francesco Nitti "Eŭropo ĉe la abismo" farita de ni, bone plaĉis en Esperantistaj kluboj, sed la vendiĝo en tiuj-ĉi rondoj ne respondis al niaj esperoj. Malgraŭ tio, ni intencas laŭ speciala deziro de ekscelenco Nitti prepari ankaŭ Esperanto-tradukon de ties nova libro "La Paco." Tiu-ĉi eldono kaŭzos al nia eldonejo grandan riskon kaj grandajn elspezojn. Per la eldono de Esperanto-libroj de Nitti la eldonejo estas servanta al la Esperanto-movado kaj estas preta ankaŭ plue fari tion kaj ekeldoni la novan libron, se flanke de la Esperanto-organizoj venos la neceza subteno por la vendado de la libro. Pri la valoro kaj la graveco de tiu-ĉi nova verko de Francesco Nitti ni ne bezonas diri al vi pluan, ĉar pri tio jam detale raportis la gazetaro de la tuta mondo. Francesco Nitti mem opinias, ke tiu-ĉi libro estas sia plej bona kaj grava."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ ĉi tiu adreso — "La Suda Kruco," Box 731 F, P.O. Elizabeth-st., Melbourne, Australia":—Amikeco, 9; Amerika Esperantisto, 3; Bulteno Antverpena 8, 9; Heroldo de Esperanto, 66 ĝis 72; Hinda Esperantisto, (Administracio, Kranggan 19/23, Semarang, Java), Unua jaro, n-ro 1; International Language, 8; Itala Esperanta Revuo, 5 ĝis 9; La Unuigita Tuthomaro, 9, 10; La Kolportisto, 4, 5; La Suno Hispana, 99-100; La Nova Tago, 2; Litova Stelo, 8/9; La Progreso, 8, 9; Oomoto, 8, 9.

S-ro Carl Preu, Fleischergasse 7, Annaberg Erzgeb, Germanujo, volas korespondi kaj interŝanĝi gazetojn, il. pk., l., p.m. Ĉiam respondos.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Club Chambers, 350 Little Colline-str., vendrede vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 66 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 decembro 1925

CONGRESS AT MONTEVIDEO.

There will be a Congress of Esperantists of South America in January next. The meeting will be held in Montevideo. S-ro Gomez, who is working wholeheartedly to ensure its success, estimates that the congress will be attended by fully 200 Esperantists from the other South American Republics. A post card and other greetings from Australian Esperantists besides being highly prized would be very effective propaganda and would accentuate the "push" s-ro Hudson has given to Esperanto in South America. Address to "S-ro Santiago Gomez, Montevideo, Rio Branco 1341, Uruguay."

NEWS FROM JAPAN.

The Sixth Congress of the Extreme East Tropical Medicine Association was held in Tokio from 11th to 31st October. Reports of the proceedings are not yet available but it was expected that delegates from various parts of Asia, Australia and America would be present. Esperanto is in very great favour with Japanese medical men and two of them, Prof. Ogato and Dr. Murata, were to address the Congress in Esperanto giving the results of their investigations into certain tropical diseases. This being the first international Congress held in Japan, a great effort was to be made

by showing the fitness of Esperanto for such occasions, and so pave the way for its being the official language of the many future international congresses of various organisations which the Japanese are confident will take place in their country.

S-ro K. Ossaka, one of the foremost Esperantists in Japan has been commissioned by this government to proceed to America to make a two years' study of American Railway methods.

PROPAGANDA.

The following is extracted from the leading article in the September issue of "Amerika Esperantisto." Australian conditions are exactly similar to those existing in America and we could say of ourselves just what our American friends have said. The movement would be helped by Australian Esperantists working along the lines recommended by "Amerika Esperantisto."

"AMERICA LAST!"

She oughtn't to be there, but that is about where she stands—in the world-wide Esperanto movement today.

Now then why is our ostensibly great country in the rear of the International Language movement? There are several reasons.

In our great one-language stretch of continent, separated by two oceans from the rest of the world, the language difficulty is less physically obtrusive than in the interjostling Babel elsewhere.

The earlier years of our national Esperanto propaganda proceeded in the wrong directions and appealed to the wrong people. The idealistic side of the movement was overemphasized, the emotions were stirred at the expense of common sense.

Now, editorially speaking, our attitude in the matter of propaganda in this country is based on the ground assumption that Esperanto does not need the United States of America, but that the United States of America needs Esperanto. Esperanto can get along without this country just as the League of Nations gets along without her. Esperanto is an established fact, just as much so as the English language is an established fact. We can correspond, carry on business, or travel almost anywhere on the civilized globe (except U. S. A.) by means of Esperanto alone, right in this present day. That is sufficient so far as American Esperantists are personally concerned. To our mind the *raison d'être* of *Amerika Esperantisto* and the Esperanto Association of North America is simply that our own fellow countrymen (for their own sakes, mind you, not ours) may enjoy the advantages we ourselves already enjoy to the full, quite the same whether they care to join us or not. We repeat, putting it more broadly, Esperanto does not need the outsider; the outsider needs Esperanto.

This brings us to the question of how best to diffuse the blessings of Esperanto among the benighted public of U.S.A. There is no need to dwell long on the theory of propaganda methods. There seem to be essential just two ways, safe, sane, but apt to be overlooked on account of their simplicity.

1. Let the language itself be physically in the eyes of the public on all possible occasions, in the form of **Esperanto lessons**. These should be printed in as many monthly, weekly and daily papers and magazines as will let us. People will thus not be learning "about" the language, but

absorbing, even unconsciously, by constantly meeting them, the forms of the language itself. Make it as easy to acquire Esperanto as possible—not asking the outsider to send off and pay for a textbook, but by spreading the lessons upon the printed medium in which he has already invested.

2. Let us urge our foreign friends to do our general proganda for us in this country; for in truth **they alone can**. Tell them to write freely to non-Esperantists in this country, either enclosing *Ĉefĉ* keys, or referring to the nearest U. E. A. delegate over here for the translation of such letters and cards. Tell them to flood our country with advertising circulars, booklets and catalogues in their various lines of business. If the American public gets a big enough avalanche of documentary evidence from abroad it will wake up to the status of Esperanto in the world at large. But it will not wake up till that avalanche comes. American Esperantists have wasted too much time theorizing with uninitiate fellow countrymen. The only really convincing propaganda comes from abroad, and the best course we can pursue is to stimulate our foreign friends to do our propaganda for us. In the very nature of the case Esperantists can achieve direct practical results only in countries other than their own."

KRONIKO.

MELBURNO, V.—En novembro la debato, kiel kutime, estis por la anoj la plej interesa ero, en la programo de la Melburna Esperanta Asocio. La elektita temo estis, "Ĉu la virino devus fortranĉi sian hararon?" kaj pro la nova modo inter la virinoj, ĝi donis okazon por tre vigla vortbatalo. La plej multo el la Klubanoj partoprenis, kaj ili esprimis siajn opiniojn klare kaj lerte, sed pro la frua foriro de kelkaj, oni ne decidis, kiu partio gajnis la debaton.

Je la sesa de novembro la anoj ricevis po du versoj el infanejaĵ rimanoj por traduki en Esperanton, kaj la provo donis amuzon, kaj estis bona ekzercado. Poste s-ino Bigelow afable deklamis kelkajn favoritajn; ekzemple: "Tomaĉjo, Tomaĉjo, fajfistido," "Kien vi iras, bela fraŭlino" kaj aliajn, kiuj tre plaĉis. . . .

LA SUDA KRUCO.
MELBURNO.

Monata gazeto pri la Esperanta
Movado.

Ni fosu nian sulkon.

Adresu ĉiujn leterojn, manuskriptojn,
ktp. al "Box 731 F, P.O. Elizabeth
St., Melbourne."

Abonojn oni povas sendi per poŝta
noto en Aŭstralio, per poŝta mandato
el Nov-Zelando kaj el ĉiuj aliaj land-
oj nur per internacia poŝta mandato
aŭ per perfektaj, neuzitaj poŝtmarkoj
de la lando, sendante la plej mal-
multajn pecojn (poŝtmarkojn) ĝis la
necesa sumo. Ni ne donas specimen-
ojn ekzemplerojn, kvankam ni vole
sendos ilin kontraŭ perfekta, neuzita
poŝtmarko, je valoro de kvin pencoj
—duono de unu svisa franko.

RESPONDO AL DEMANDO.

Korespondanto skribis, demandante
kio estas la unua devo de aŭstraliaj
esperantistoj, ĉu subteni la U.E.A.,
ĉu niajn naciajn esperantajn organiz-
aĵojn? Por ĝuste respondi oni devus
rigardi nian movadon kiel vivantan
korpon havantan koron, arteriojn, vej-
nojn, zangon kaj animon. La U.E.A.
similas la koron, la diversaj naciaj
organizaĵoj similas la arteriojn; la
diversaj naciaj grupoj similas la vej-
nojn; la Fundamento de Zamenhof
similas la sangon, kaj sendube la maj-
stro mem ankoraŭ restas kiel la ani-
mo de esperantismo.

Oni facile povas kompreni, ke la
tuto devas funkcii kune; se eĉ unu
parto ĉesus funkcii, kompreneble disi-
ĝo ekkomencus. Por nutri la koron
de nia movado necese estas forte su-
teni la naciajn organizaĵojn kaj
grupojn, ĉu grandajn, ĉu malgrand-
ajn. Ankaŭ estas devo por ĉiu esper-
antisto subteni la diversajn naciajn
Esperantajn ĵurnalojn kiuj agas kiel
disvastigiloj por Esperanto.

Dum la mondmilito kelkaj nacioj ne
povis daŭrigi la laboron por Esperan-
to. Grupoj kaj organizaĵoj disiĝis
kaj tuj la U.E.A. sentis tiun okazaĵon,
la nombro da anoj ĉiam pli kaj pli
malgrandiĝis. Sed post la mondmilito
la diversaj naciaj organizaĵoj denove
komencis funkcii kaj tuj la U.E.A. re-
ciproke sentis tion. Sufiĉe dirite.

EL LETEROJ DE VOJAĜANTA
AŬSTRALIANO.

Kara amiko,

La ŝipo "Chicago Maru" restis ĉe
Rio de Janeiro, iom pli ol du tagojn,
kaj mi uzis ĉiujn eblajn minutojn por
travagi la belegan urbon kaj alrigar-
di la belegan havenon, kaj ĉar mi
ĉiam promenadis, kune kun du aliaj
pasaĝeroj, mi ne trovis oportunan
okazon por viziti la samideanojn. Mi
jam antaŭe skribis al la Rio delegito,
sed, ĉar la dato de la alveno de ŝipo
estis tre necerta, mi ne surpriziĝis,
ke li ne venis al la kajo por renkon-
ti min.

Ĉe Santos la ŝipo restis preskaŭ tri
tagojn, kaj unu el la tagoj ni vojaĝis
60 mejlojn al San Paulo, urbo kun pli
ol miliono da loĝantaroj. Alveninte
Buenos Aires, mi vane klopodis trovi
la Esperantan grupon, kiu, laŭ la jar-
libro, kunvenas ĉiun tagon. Mi poste
sciigis, ke tiu grupo ne plu ekzistas.
Mi skribis al s-ro Gomez, la delegito,
kaj la sekvantan matenon li vizitis
min ĉe la hotelo. Ii estas tre afabla
homo, kaj jam multe gvidis kaj help-
is min. S-ro Gomez montris al mi,
kie nun kunvenadas la sola grupo en
Buenas Aires, kaj mi vizitis tiun
grupon. Tie mi renkontis 20 sami-
deanojn, kiuj tre afable akceptis min,
kaj pro mia ĉeesto la kunveno daŭris
ĝis la 12a p.t.m. La sekvantan tagon,
la vic-delegito, s-ro Villafranca, venis
al la hotelo je la 9a horo matene kaj
ni kune faris tre longan ekskurson
tra la urbo. Por fari tion, ni veturis
per tramoj, subtera tramo, elektrava-
gonaro, omnibusoj kaj aŭtomobiloj.
Ni ankaŭ vizitis la ĉevalkurejon, kie
ni vidis du kurojn kaj amasegon da
homoj; poste ni vizitis la agrikultur-
an ekspozicion, kaj kiam mallumiĝis
vizitis muzikan societon, kie oni hore
kantadas, kaj fine dancadis ĝis la
deka horo, kaj post tiu horo mi ves-
permanĝis ĉe s-ro Villafranca, kaj
fine atingis mian hotelon meznokte.
Multaj plezuroj por unu tago, ĉu ne?
Mi jam restis en Buenos Aires ok
tagojn, kaj restos ankoraŭ du, kaj
dimanche venonta mi komencos la
vojaĝon al la akvofalegoj Iguazu,
kiuj estas pli altaj ol tiuj de Niagara
kaj pli larĝaj ol tiuj de Victoria. La
Iguazu faloj estas 65 metroj altaj kaj
3500 metroj larĝaj, kaj por atingi

Iguazu mi devos vojaĝadi dum kvar tagoj per tri rivervaporŝipoj. Revenante mi vizitos Asuncion, la ĉefurbon de Paraguay; tiu ĉi flankvojaĝo okupos eble du semajnojn. Kiam mi estos reveninta al Buenos Aires mi vizitos Montevideo'n kaj poste el Buenos Aires iros al Valparaiso kaj vizitos multajn urbojn antaŭ ol mi atingos la urbon, Panama. Mi eble alvenos al Wellington, Nov-Zelando, je la 14 decembro. Ĝis nun mi multe ĝuis la vojaĝadon, precipe la viziton al Buenos Aires, kie la samideanoj estas tiel afablaj. Pro la ĉeesto de nia Reĝido, Buenos Aires estas gaja loko, kie troviĝas multaj vizitantoj. Hodiaŭ (3/9/25) mi denove renkontis s-ron Gomez kaj li helpis min aĉeti vojaĝbiletojn por mia ekskurso al Iguazu, ĉar ĉe la oficejo neniu parolas angle.

Sur la ŝipo Bruselas, 16 septembro — El Buenos Aires mi veturis per ŝipo, (9 horojn), al Montevideo. Tie mi renkontis la delegiton, s-ron Pedro Casas, la eks-delegiton, s-ron M. Fernandez, kaj multajn aliajn afablajn samideanojn. Inter aliaj s-ro Santiago Gomez multe helpis kaj gvidis min. S-ro Fernandez prezentis min al s-ro Henriko Munoz, riĉa homo kiu loĝas en palaco, kaj mi ankaŭ vizitis s-ron Munoz ĉe lia hejmo, kie ni babiladis, trinkis teon kaj aranĝis fari ekskurson en la morgaŭa tago. Tion ni faris. Ni vizitis la belan marbordon kaj poste la nove konstruitan parlamentejon, kiu kostis du milionojn da funtoj sterlingaj. Estis nur per la helpo de s-ro Munoz, ke mi novis viziti tiun marmoran palacan konstruaĵon, ĉar la sola tago por vizitantoj estas dimanĉo, kaj mi ne volis resti tiel longe en Montevideo, kiu estas nur malgranda urbo kaj mi, en la kvar tagoj dum kiuj mi restis tie, dank'al la Esperantistoj, vidis ĉion, kio estas vizitinda. Ĝus kiam mi skribis la lastan vorton de la lasta frazo, mi preskaŭ estis ĵetita al la planko, ĉar la ŝipo dum ĝi rapide iris en la mallumo, frapis la fundon de la rivero, kie la akvo ne estas sufiĉe profunda. Nun oni laboras por liberigi la ŝipon, kiu ne estas difektita. Hodiaŭ matene okazis same kaj oni bezonis duonon da horo por liberigi la ŝipon. Mi lasos la maristoj zorgi pri la ŝipo. Estas tiel mallume, ke mi nenion povas vidi, ne eĉ la riverbor-

dojn kaj mi daŭrigos la leteron, ĉar se ni estos bonŝancaj, en la morgaŭa mateno ni atingos Paraguay'on, kaj tie mi volas enpoŝtigi tiun ĉi leteron. Nun, denove, la ŝipo antaŭen iras; ni restis sur la riverfundo nur dudek minutojn. Nun mi estas survoje al Asuncion, la ĉefurbo de Paraguay. Ni vojaĝas per padelŝipo havanta ĉirkaŭ la saman grandon kiel la "Ozone," (Havena ŝipo ĉe Melburno. Red.) kaj ni devas vojaĝi dum kvar tagoj por atingi Asuncion, kiu, sekve de la multaj kurbiĝoj de la rivero, estas malproksima de naŭcentmejla vojaĝo de la marbordo. Unue ni estis sur la rivero Rio de la Plata, kies buŝo estas 180 mejlojn larĝa, poste ni laŭiris la Rio Parana, alian grandan riveron, nun ni estas sur la Rio de Paraguay, kaj morgaŭ matene mi atingos Asuncion. La ŝipo restos tie tri tagojn kaj la revena vojaĝo al Buenos Aires okupos tri tagojn plu. La reveno estas pli rapida pro la forta fluo de la riveroj. Kiam mi lasis Buenos Aires estis malvarme. Ni ĉiam vojaĝas norden, kaj jam nun ni estas en la tropikoj, kaj estas varme; palmoj kaj bananarboj kreskas sur la insuloj kaj la riverbordoj, kaj troviĝas en la rivero multaj aligatoroj. Hodiaŭ mi vidis kelkdekojn, kelkaj el ili almenaŭ dekkvin futojn longaj! Troviĝas en Asuncion nur unu samideano kaj li estas ankoraŭ lernanto. S-ro Gomez, ĉe Montevideo, donis al mi lian adreson kaj, skribinte al li, mi esperas renkonu lin. Sur la ŝipo neniu povas paroli angle tial mi estis muta dum la lastaj tri tagoj. Salutojn al vi, ankaŭ bonvole saluti la grupanojn en mia nomo. Fidele via Percy T. B. Hudson.

Nuntempe, kiam ĉiu posedas kaj uzas fontanplumon, estas utile scii kie oni povas sendi sian difektitan plumon kun plena certeco, ke ĝi estos rebonigita de fidinda specialisto. Tia specialisto estas nia samideano, s-ro Harold Pudney, al kies reklamo aperanta sur alia paĝo ni petas la atenton de tiuj legantoj, kiuj bezonas riparojn al siaj fontanplumoj aŭ intencas aĉeti novajn.

RECENZOJ.

ESPERANTA LEGOLIBRO, B kaj E. Migliorini. A Paolet, eldonanto, S. Vito al Tagliamento, Italujo. Prezo, lire 5, (Proksimume 1 ŝ. angla)

Jen libro, kiun oni povas kore rekomendi. En 142 paĝoj troviĝas: Unua parto—Tra la vivo,—simplaj frazoj, proverboj, historioj anekdotoj, legendoj, diversajoj; Dua parto —Tra la lingvo—enhavas tre valorajn konsilojn pri Esperantaj vortoj pri stilo kaj kiel akiri bonan stilon. La tria parto—Tra la Literaturo—estas riĉa je prozo kaj verso. Gesinjoroj Migliorini meritas laŭdon pro sia bona komprenemo de temoj kiuj estas la plej taŭgaj kunmeti en unu legolibro. (C.W.B.)

VI SOLA ESPERANTO, povas fari tiajn miraklojn! Unuakta originala teatraĵo. Premiita ĉe la X-aj Internaciaj Floraj Ludoj. Arturo Ghez. A. Paolet, eldonanto, S. Vito al Tagliamento. Prezo Liro 1½, (proksimume 4 anglaj pencoj).

Amuza farso en ses scenoj. La roloj estas por kvin personoj; tri viroj kaj du virinoj. (C.W.B.)

LA BATALO DE FLOROJ EN VALENCIO.

La Batal' komenciĝas. La popol' entuziasme al la ĝoj' sin donas Ĉie lum' kaj koloro kaj petol', en kiujn arde la popolo dronas.

Pasas kaleŝoj en triumfa bel' kun virinoj ridantaj per rigard' Kaj la floroj flugante sub ĉiel' vizaĝojn celas kun kisanta ard'.

La Batalo finiĝas, mortas jam.. Sed ankoraŭ ĉe l' floroj estas am', gajec' en la rigard' ĝoj en la kor!

Estas ĉiu virin' — parfuma, bela Malsupre, tere, estas florodor'; supre, ĉiele, estas brilo stela.

Miquel Duran I Tortajada.

El la kataluna lingvo tradukis,
Jaume Grau Casas.

Premiitaj dum la lastaj Internaciaj Floraj Ludoj en Palma de Mallorca.

—(La Suno Hispana)

ESPERANTO EN LA SERVO DE NOVAJ ELTROVOJ.

Estus interese, se alilandanoj publikigus novajn eltrovojn de ĝenerala intereso en la Esp.-gazetaro. Per tio oni pruvus la utilon de Esperanto kaj ĝian disvastigon tra la mondo.

Ĉar multaj geesperantistoj amatores sin okupas pri la fotografado, en la intereso de nia propagando estas utile atentigi ilin pri nova eltrovo.

Tiuj, kiuj uzadas platajn filmojn, bone scias, ke tro ofte la negativoj estas malbonigitaj de lumstrioj aŭ lumfasko, ĉar la lumo iel penetris en unu el la anguloj aŭ flankoj de la kartona filmskatoleteto, spertuloj ofte serĉis rimedon por eviti tion, sed vane ĝis lastatempe kiam s-ro Boogert, el Hago, konstruis novan modelon, kiu garantias, ke tiu maloportunaĵo ne povas okazi.

Anstataŭ ĉe la flanko, kiel ordinare, oni tiras la impresigitan filmon el la mezo de la filmujo, kie troviĝas fendeto. La fizika principo estas, ke la lumradioj neniam faras du angulojn. Rimarkinde ankaŭ estas, ke oni povas eligi kiun ajn impresigitan filmon por aperigi la bildon, ne elprenante la skatoleton el la ujo.

Pri la nova eltrovo, kiu estas patentita en ĉiuj landoj, la asocio Anonima "Nebo," Laan van Neerdervoort 18 en Hago (Nederlando) volonte donas informojn. La pakitaj filmoj estas haveblaj pere de fotografaj magazenoj.

RADIO-DISAŬDIGO PRI ESPERANTO.

La 30-an de Aŭgusto s-ro Ĉikao Fujisaŭa, Prof. de Kiuŝiu Imperia Universitato, faris paroladon propagandan pri Esperanto ĉe l'radistacio J.O.A.K. en Tokio je 13. 30h. Tio estas la unua parolado pri Esperanto, disaŭdigita de J.O.A.K. kaj la elokventa parolo tre influis sur ĉiujn aŭskultantojn.

Ĉi tiu stacio estas iufoje aŭdate en Aŭstralio, sed malfeliĉe la sukcesintaj aŭskultantoj ne estas Esperantistoj. J.O.A.K. estas la unua fremlanda stacio, kiun oni bone aŭdis en Aŭstralio kaj certe devus influu la lokajn radianojn, instigante ilin lerni la lingvon de la amatoro-radiano Esperanto.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata Amiko,

Unu el miaj samklubanoj s-ro "Ho Bo" bonvolas anstataŭigi min sendante al vi, en formo de letero, la sekvantajn faktojn pri la "Frua Historio pri Aŭstralio."

Aŭstralio estis eltrovita de Ŝipestro Cook dum 1770. Tiam nur m-deĝenaj nigruloj loĝis vagade en la lando, plejparte ili estis sovaĝuloj. Ŝipestro Cook ne restis longe ĉe la nova kontinento.

En 1788 alvenis kelkaj ŝipoj el Anglujo, alportante 1024 pionirojn, kaj kapitano Phillips por la Brita Imperio laŭforme aneksis la landon je 26 Januaro tiun jaron. Oni starigis kolonion ĉe Sidnejo. Pli poste franca navigacianto—Laperouse—elŝipiĝis ĉe la golfo "Botany," apud Sidnejo. La pioniroj ekkomencis kulturigi la teron, semis tritikon kaj hordeon, ankaŭ plantis vinberojn. Dum la sekvanta somero oni rikoltis la unuan rikolton. Post du jaroj, alvenis dua ŝiparo el Anglujo kun roto da soldatoj kaj kelkaj civilaj pasaĝeroj. Dum 1792 la unua fremda komerca ŝipo alvenis el Anglujo, kaj tiutempe la enloĝantoj havis la nombron de 4203 homoj. En 1793 la unua preĝejo estis konstruita en Sidnejo. 1795 oni starigis la unuan pres-maŝinon. 1796 estis konstruita la unua teatro, ankaŭ ĉe "Newcastle"—norda urbeto apud la marbordo—oni eltrovis karbon.

1797. Kelkaj progesemuloj importis merinosajn ŝafojn el suda Afriko.

1800. La nombro de la enloĝantoj pligrandiĝis ĝis 5995 personoj.

1801. Oni fabrikis la unuan litkovrilon el lano kaj ankaŭ tolaĵon.

1802. Vojaĝantoj eltrovis golfojn ĉe suda Aŭstralio kiujn oni nomis "Spencers" kaj sankta "Vincent," ankaŭ oni eltrovis du havenojn ĉe Kvinslando nome "Curtis" kaj "Bowen."

1803. Ŝaf-bredantoj ekkomencis la

eksportadon de ŝaflano. La unua ĵurnalo—"La Sidneja Gazeto"—estis eldonita.

1810. Oni malfermis la unuan poŝt-oficejon—en Sidnejo.

1817. La unua monbanko estis konstruita. Balen-kaptistoj kaj ŝafbredistoj bonege prosperis.

1819. Estis malfermita la unua ŝtata ŝpar-banko.

1823. Oni eltrovis oron en Nova Sud-Kimrujo.

1827. Kupro estis eltrovita apud la haveno "Macquarie."

1829. Starigis kolonio ĉe "Swan" rivero en okcidenta aŭstralio.

1830. Batalo okazis inter la blankuloj kaj la indiĝenaj nigruloj.

1831. La registaro vendis parcelojn da tero per publika aŭkcio. La unua vaporŝipo—"Sophia Jane"—alvenis el anglujo. Oni eksportis karbon el la regiono "Newcastle" en Nova Sud-Kimrujo.

1835. Fondis Melburnon, John Pascoe Fawkner.

1838. La unua Melburna tagĵurnalo estis eldonita Misiistoj germanaj fondis mision ĉe Brisbano.

1839. Esplorantoj eltrovis multe da fruktodonaj terregionoj.

1841. Nov-zelando apartigis sin de Aŭstralio.

1845. Multaj esplorantoj vojaĝis tra la kontinento kaj eltrovis ĉiajn mineralojn ankaŭ riverojn, montojn kaj kulturigeblajn regionojn.

1846. Romkatolikaj misiistoj fondis novan mision ĉe "Perth" en okcidenta aŭstralio.

1847. Oni starigis ferfandejon en Nova Sud-Kimrujo.

1848. En Okcidenta Aŭstralio esploranto eltrovis kupron kaj plumbon. Esploranto Leich-hardt pereis dum li elserĉis kvinslandon.

1850. Oni komencis konstrui la unuan fervojon en Sidnejo.

Bonega resumo de niaj fruaj tagoj, ĉu ne? Amike via

KARLO MADRIGALO.

HAROLD PUDNEY**Specialisto pri Fontanplumoj.**

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson.

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

LA NAIVA MALJUNULO.

"Edzino," diris la maljunulo, "Estas nun la tempo por pagi la luprezon. Kiom da funtoj ni havas en la domo?"

Estas la kvardek funtoj kiuj ni sparis por pagi la luprezon de la pasinta duonjaro, kaj tio kuŝas sub la ŝtono en la kamero; en la poŝo de mia plej bona pregamvesto estas kvin ŝilingoj kaj tri pencoj; estas deknaŭ ŝilingoj kaj kvin pencoj enmetita en la truon de la kamertubo; estas unu penco kion mi trovis sur la vojo kiám mi hejmeniris de la foiro; estas dekdek funtoj kaj unu ŝilingo kaj kvar pencoj, kiu ni ricevis por la butero kaj ovoj: estas la mono ricevita por la lano de la ŝafoj, tio ĉi kuŝas sub fasko de fojno en angulo de la stalo de maljuna Tib, pro timo, ke ŝtelistoj neatendite vizitos nin. Tio ne estas ĉio, ĉar sub la kapa finaĵo de la lito en la okcidenta ĉambro estas kesto, kaj en la kesto estas ligna sitelo, kaj en la sitelo vi trovos ses funtojn kaj deknaŭ ŝilingojn kaj dek pencojn, kaj sub la antaŭa sojlo

Sed la naiva maljunulo aspektis konfusite kaj komencis skui la kapon kaj froti la okulojn. "Edzino" li diris, "Ĉu vi ne povas kunmeti ĝin kaj amasigi ĝin, kaj min diri, ĝi estas tute ĝusta." Tiam, mi selos maljuna Tibon kaj iros al la luiganto, mi diros "Jen estas la kvardek funtoj por la pasinta duonjaro, kaj jen estas la kvardek funtoj por tiu ĉi duonjaro. Mi ne estas klerulo sed mia edzino certigas, ke ĉio estas tute ĝusta." "Mi ja pensas" respondis la edzino, iom akre, "ke estos pli bone se mi surrajdos maljunan Tibon kaj iros mem." "Vi tion farus, mi volas vi tion farus," diris la naiva maljunulo, humile. "Ĉiam mi estas timema, ke mi perdos iom de la mono." "Ne, mi ne iros," diris lia edzino, "Kio utilo estas havi viron, se li ne povas fari tion, kion vi diras al li?" Tial, la naiva maljunulo suriris maljunan Tibon, kaj rajdis el la pordego.

"Nun, se vi renkontos ŝteliston survoje, memoru diri al li, ke vi iras pagi la luiganton, kaj ke vi havas okdek funtojn en via leda selo." "Vi estas tiel naiva, ke mi vere kredas tio estas ĝuste kion vi ja farus," ŝi diris al si, brufermante la pordon. Dum li trotetis sur la ĉefvojo, renkontis lin

belega sinjoro, rajdanta sur nobla nigra ĉevalo, havanta argentajn ornamajojn sur sia selo, kaj belan nigran saketon ornamitan per argento ĉe la anguloj. "Bonan matenon," diris la belega sinjoro. La naiva maljunulo respondis humile, "Bonan matenon, kaj mi respektplene dankas vin, sinjoro, pro tio, ke vi parolas tiel amike al tiel simpla maljunulo, kiel mi estas."

Ĝis kie vi iras," demandis la belega sinjoro. La maljunulo ridetis kaj respondis tre malhumile por tiel humila maljunulo, "Mi iras pagi mian luprezon, sinjoro. Estas nur du mejloj malproksime, sinjoro, kie loĝas mia luiganto. Ni ne pagis lin la pasintan duonjaron, sed, sinjoro, tio ja ne estis mia kulpo ĉar li estis for de sia hejmo." "Kaj tial, vi pagos lin nun ĉu ne?" demandis la belega sinjoro.

(Daŭrigota.)

DEATH OF S-ro. SILBERNIK.

S-ro Joseph Silbernik, for many years chief delegate of U.E.A. in New York, died there on 30th August. S-ro Silbernik was a brother of the late s-ino Zamenhof. During recent years his health has not been good and in spite of medical warning he attended the Geneva Congress at which he was anxious to meet his nieces, the daughters of D-ro Zamenhof. His death occurred three days after his return to America. S-ro. Silbernik was one of the most active Esperantists in North America and his death will be greatly deplored.

RECEIPTS (SUBSCRIPTIONS).

Up till 30th November the following sums were received, (the figures in brackets indicate the month and year to which payment is made):—A. W. Bassett, 4/6 (9/25); J. Parker, 4/6 (11/26); Persista Grupo, 5/6 (6/26); W. R. Browning, 10/- (11/26); Edith Anderson, 4/6 (11/26); M. C. Trundle, 4/6 (12/26) and donation, 3/6; F. Tondut, 4/6 (6/26); G. D. Nash, 9/- (1/26); A. H. McPhie, 13/6 (7/26); P. Leahy, 4/6 (7/26); C. Unyin, 6/3 (7/25); J. Scurrie, 10/- (3/26); M. Purnell, 4/6 (12/26); G. Redfern, 10/- (6/27); A. A. Kelley, 4/6 (10/26); Pyke's Book Shop, 12/- (10/25); sundries, 3d., 7/-, 2/-, 1/-.

OUR SUPPORTERS.

S-ro Maŭrico Hyde, Rabaul, skribas — "Ĉiunonate mi avide legas "La Suda Kruco" -n. Ĉi tie mi, kiel multaj aliaj izolitoj, sentas la valoron de la gazeto."

S-ino A. H. McPhie, Cleve, S.A., writes: "I wish the 'Suda Kruco' every success."

Miss M. C. Trundle, Eumundie, Queensland, writes: "The little magazine comes most regularly. It is a great help to the solitary student, and it is of international value also. It deserves better support."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnalojn laŭ ci tiu adreso — "La Suda Kruco," Box 731 F, P.O. Elizabeth-st., Melbourne, Australia":— Amikeco, 10; Austria Esperantisto, 8/9; Arbeiter Esperantisten, 6; Amerika Esperantisto, 5; Esperantista Junularo, 29/30; Heroldo de Esperanto, 73 ĝis 78; La Suno Hispana, 101; Le Monde Esperantiste, 140; La Ridanta Esperantisto, (Elze, Hanover, Bahnhofstr 24a) Jaro 1, numero 1; La Revuo Orienta, 10; Nova Sento, (Gokurakĝunaĉi 32, Fukuoda, Japan) 4.

Kvankam "La Suda Kruco" estas regule elsendata, ĝi ne, en la lasta tempo, ricevis ekzemplerojn de Brazila Esperantisto, Holanda Esperantisto; Homeco; Hungara Esperanto; Literatura Mondo; Novaj Tempoj; Sennacieca Revuo; Radio de Filintern; Arguso; La Policisto; Esperantio; La Progreso. Ĉu la koncernataj gazetoj bonvolos kontroli siajn sendlistojn?

S-ro K. A. Susuki, P.O. Box 79, Orange, Texas, Usono, deziras korespondadi per PI kun ĉiuj landoj. Tuj respondos.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str.; Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melburno. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 pm. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.